

Programo de KKPS



Lifelong Learning Programme
Grundtvig

Horo	Granda salono	Malgranda salono	Halo
Vendredo			
14:00	Akceptiĝo kaj klaĉado		
18:00	Vespermanĝo		
20:30	Koncerto de Malvo		
23:00	Halovina festo	Homlupa ludo	
Sabato			
8:30	Matenmanĝo	Matenmanĝo	
9:30	Prelego pri estonto	Kurso komencantoj	Kurso komencontoj
10:45	Kafpaŭzo	Kafpaŭzo	
11:15	Prelego pri harpo	Kurso komencantoj	Kurso komencontoj
12:30	Tagmanĝo	Tagmanĝo	
14:00	Merkatumado	Kurso komencantoj	Kurso komencontoj
15:15	Kafpaŭzo	Kafpaŭzo	
15:45	Merkatumado	Kurso komencantoj	Kurso komencontoj
18:00	Vespermanĝo	Vespermanĝo	
19:00	Ordigado	Paŭzo	
20:00	Danc-ateliero		
21:00	Koncerto Kapriol'		
23:00	Diskejo		
Dimanĉo			
8:30	Matenmanĝo	Matenmanĝo	
9:30	Merkatumado	Kurso komencantoj	Kurso komencontoj
10:45	Kafpaŭzo	Kafpaŭzo	
11:15	Merkatumado	Kurso komencantoj	Kurso komencontoj
12:30	Tagmanĝo	Tagmanĝo	
14:00	Adiaŭoj		Plaĝa promeno



Pos-Amiko

Aŭtuno 2014, Numero 10

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Jam la 10-a numero!

1. Katalunujo deklarita sendependa

2. Raporto de la komitatkunsido de TEJO

3. Amsterdamo suferas invadon de italoj

3. El la tombo de Zombenhof

3. Horoskopoj

4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de Nederlanda Esperanto-Junularo kaj aperas kvarfoje en la jaro.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

<http://kkps->

[klacxkunveno.wikispaces.co](http://klacxkunveno.wikispaces.com/Pos-Amiko)

[m/Pos-Amiko](http://klacxkunveno.wikispaces.com/Pos-Amiko)

Jam la 10-a numero!

Kara partoprenanto de KKPS, vi tenas en viaj manoj (aŭ legas de la muro) jam la 10-an Pos-Amikon. La tuta redakta teamo, do mi, estas tre fiera pri tiu ĉi granda atingo. Mi dubas, ke estas multaj, kiuj legis ĉiujn numerojn papere (precipe la antaŭan, kiu aperis en malmultaj lokoj), sed feliĉe oni ĉiam povas legi la malnovajn numerojn en nia retpaĝo (vidu la kolofo-non). Fine mi ankaŭ petas al vi, se vi havas novaĵojn, kontribuojn, rimarkojn, korektojn aŭ petojn, ne hezitu skribi al mia redakta adreso. Ek al pliaj dek!

Katalunujo deklarita sendependa

Post multaj interkvereloj kaj procesoj inter Madrido kaj Barcelono la hispana registaro en dimanĉo decidis solvi en unu ago ĉiujn problemojn kun sia rebelema regiono per deklaro de sendependeco. La ĉefministro Rajoy klarigas:

“Ekde la 10-a de novembro Hispanujo sin deklaras sendependa de Katalunujo. Tio signifas, ke ekde tiam hispanaj leĝoj ne plu validas en la teritorio, trajnoj ĉesos al ĝi veturi, kaj ĉiu kataluno en la resto de Hispanujo estos forsendita kiel senpermesa eksterlandano.”

La hispana registaro krome planas la konstruadon de 400-kilometran muron kun la novkreita lando. La konstruado kreos laborpostenojn por la tuta senlabora hispana junularo.

Eŭropaj politistoj reagis aprobe al la hispana iniciato. La germana ĉefministro Angela Merkel klarigis:

“Tiu ĉi nova aliro al memdecidiĝo pri sendependeco malfermas multajn porojn por ni. Imagu, ke la EU povus sin deklari sendependa de Britujo, aŭ la Eŭrozono de Grekujo!”

-noto de la redakto: tuj antaŭ la printo de tiu ĉi Pos-Amiko Germanujo sin unanime deklaris sendependa de Angela Merkel.

Raporto de la komitatkunsido de TEJO

Dum la 71-a IJK en Fortalezo, Brazilo, la komitato de TEJO kunsidis por decidi pri la agado kaj estrado de TEJO. Ĉar post unu jaro ankoraŭ apenaŭ iu el la komitatanoj legis la laborplanon 2013-14, la sekretario prokrastis sendi la novan. Sube estas listigitaj la plej gravaj decidoj de la kunsido.

La komitato taksas tre grava la bonan organizadon de komitatkunsidoj, kun komfortaj seĝoj, sufiĉaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kaj repago de ĉiuj vojaĝkostoj de la komitatanoj. Necesos iom da reorganizo de la financoj de TEJO por atingi tiujn postulojn.

La unua paŝo por ŝpari monon estu la nomumo de Michael Boris Mandirola por la kampo Informado, tiel ŝparante pri la kostoj por elektronikaj komunikiloj. Krome oni konsideris eblecojn por pagigi kruelimposton kaj aliajn impostojn (vidu Pos-Amikon #4) ankaŭ ekster renkontiĝoj.

Propono por ekzekutado de krokodilantoj ne ricevis plejmulton de la voĉdonoj, sed la estraro estas taskita elpensi taŭgan nemortigan turmentpunon. Aliflanke la mortpuno por volapukistoj ricevis klaran subtenon de la komitato.

Finfine unu komitatano plendis, ke la nova laborplano estu printita sur pli bona papero, por ke oni povu pli facile per ĝi malfermi bierbotelojn.

Amsterdamo suferas invadon de italoj

La nederlanda ĉefurbo, kutime trankvila deca urbo, ĉi-vendredo estis brute vekita de dekopo da bruemaj turistoj. La grupo, kiu provis en kelkaj horoj vidi la tutan urbon, plendis pri la kafo en la kafejoj, ĝene haltis ĉe ruĝaj trafiklumoj, kaj parolis kun laŭtaj voĉoj, ĉefe la gvidanto. Feliĉe por la enloĝantoj la grupo vespere foriris en norda direkto.

El la tombo de Zombenhof

Halovino estas la plej bela tempo de la jaro por zombioj. Finfine oni komplimentas mian aspekton anstataŭ kriante forkuri de ĝi. Mi nur malĝojas, ke pro la nuligo de noktaj trajnoj mi estonte ne plu povos iri al la halovinaj festoj de KKPS. Kial tiu ĉi tipa usona festo iĝis tiom populara inter esperantistoj, kiuj kutime malŝatas ĉian kulturalan imperialismon? Ĉu ĉar timemuloj tiel ne bezonas montrisiajn vizaĝojn? Ĉu esperantistoj tiom ŝatas kukurban supon?

Ne, mi pensas ke la allogo de Halovino estas en tio, ke oni povas esti tio, kion oni deziras esti. Se en normala tago vi vestiĝus kiel kosmonaŭto, homoj ja strange rigardus, sed nun vi povas! Ĉi-halovine mi do kostumiĝos kiel normala malfama homo, kio povas iri surstrate neperturbita de zelotoj aŭ biografioj. Do se vi renkontos dum la festo iun nekonaton kun griza barbo kaj ĵubrovko en la mano, diru nenion, nur tostu.

-Lazaro Zombenhof

La horoskopo

Ŝafo: Vi ne rimarkos ronkantan kunloĝanton pro sukcesa trinkejo.

Taŭro: Novembro estas bona monato por tranokti en stacio.

Ĝemeloj: Vi malkovros, ke merkatumado pli utilas ol kanabfumado.

Kankro: Atentu ne konfuzi la simptomojn de ebolo kaj PRS.

Leono: Vi malsukcesos ekzamenon pro relegado de Pos-Amikoj.

Virgulino: Post sukcesa merkatumado vi ne plu estos.

Pesilo: Vi tendumas en mallumo kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Fundamentisto ĝenos vin insistante, ke vi estu Skorpujo.

Aleks Kadar: Vi iĝos la plej fama malfamulo por 15 minutoj.

Sagitario: Plaĝumi en aŭgusto montras pigrecon, plaĝumi en novembro montras karakteron.

Kaprikorno: Vi plej facile solvas ekzamenojn per koncentrita acido.

Akvisto: Vi kreos novan koktelon el kukurbo kaj glicirizo.

Fiŝoj: Vi deklaras vian kunloĝanton sendependa de via ĉambro.

